


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

LA FAJRO.

(Erika Linz denove rakontas al ni veran okazaĵon el la brazila pra-arbaro apud Caragüatutaba).

„Do vi, patrino, nepre ne lasu transsalti la fajron en la supran angulon de la arbaro!” diris Harro.

„Ne trankviliĝu! Mi jam preparis tie tri verdajn branĉojn.”

Harro foriris por ekbruligi nian tiel nomatan „roĉa”-on. Kio tio estas? Dehakita arbaro-peco, kie oni baldaŭ plantos. En la monatoj sen-r (majo, junio, julio, aŭgusto) oni devas prepari ĝin. Per la foiso, speco de tre forta falĉileto, oni tranĉas ĉiujn herbojn, arbus-tojn kaj lianojn tuj super la tero kaj ankaŭ la maldikajn arbojn. Poste oni per hakilo hakas la pli dikajn arbojn. Ekestas terura, preskaŭ nepenetrebla haoso de ĉiuspecaj kreskaĵoj, unuj sur aliaj en ofte ĝis 2 metrojn dika tavolo. Kaj tiu restas en la varmega suno, kiu brilas en tiuj „vintraj” monatoj plej ofte ĉiutage, ne interrompate de pluvo.

Kiam oni rimarkas, ke alproksimiĝas la unua printempa pluvo, en la lastaj tagoj de aŭgusto, oni ekbruligas ĉion. Forbrulas la sekaj branĉaro kaj foliaro kaj restas sole la karbumitaj pli dikaj arboj kaj la multaj trunkstumpoj, kiujn oni lasis unu metron altaj

pro la pli facila laboro kaj malgranda valoro de la ligno.

Kaj tia tago de forbrulado estas hodiaŭ. En tiu ĉi jaro ni forhakis deklivon. Harro ekflamigis bambuon kaj komencas en la nomita angulo, kiè estas la plej granda danĝero, ke la fajro transsaltos en la arbaron. Nun la ankoraŭ malforta flamo forbrulu ĉi tie ĉion bruleblan, por ke poste la forta, de malsupre venanta fajro ne plu trovu nutraĵon, kiu povus esti al ĝi ponto al la staranta arbaro. Verŝajne fariĝos tiel, ĉar preskaŭ ne estas vento. Sed tamen mi ricevis la taskon garde stari ĉi tie kaj mortbati la eventuale tamen venantan fajron per verdaj branĉoj. Baldaŭ post Harro mi suprengrimpis la deklivon al mia posteno. De ĉi tie mi povas vidi la tutan brulontan pecon. Antaŭ mi jam estas larĝa, forbrulinta strio. Ĉio sekiĝis tre bone. Tamen la ruĝa fajro-ondo rampas nur maldiligente, kvazaŭ malvolonte de la monto malsupren. Supreniri deziras ĝi! Sed supre estas la 3 metrojn larĝa ŝirmstrio, de kiu ni zorge forigis ĉion bruleman kaj eĉ forhakis ĉiujn vegetaĵojn. Tiun la malforta fajro ne povas transsalti.

Harro kaj Aleksandro iras kun siaj brulantaj bambutorĉoj, unu dekstre, la alia maldekstre de la forhakita peco malsupren kaj ekbruligas la sekan planto-amason post ĉiuj 3—4 paŝoj. Ĉie krakadas kaj ĉie supreniras blanka fumo al la ĉielo. Nun granda ekflamo kaj tuj poste eksplodo post eksplodo, kvazaŭ pafoj. Harro ekbruligis la unuajn dehakitajn bambuojn, kiuj krevas pro la varmego. La fumo fariĝas griza kaj nigra. La ruĝaj flamolangoj enpenetras de ambaŭ flankoj ĉiam pli profunden en la centron. Majesta bildo! Preskaŭ ne blovas vento. Estas tre taŭga tago.

La ĉielo tute griziĝis. Certe hodiaŭ dumnokte pluvos. Morgaŭ ni eltiros la trunkojn kaj postmorgaŭ ni plantos.

Nun ili estas ambaŭ malsupre kaj ekbruligas la malsupran randon. Ha, tuj la fajro ricevas pli grandan forton. Dekobliĝas la krakado kaj la fumo kaj flamoj formanĝas malsategaj ĉion, kion ili renkontas. Alten flugas brulantaj folioj. Ĉu ĝi haltos ĝustatempe? Ĉi tie la fajro jam formanĝis ĉion de supre malsupren proksimume dek, duk du metrojn. Sed ĉi tie supre en la arbaro estas sekaj filikoj. Tio estas danĝero!

Kaj nun la vento komencas blovi supren sur la monton! Ĉiam pli rapide la fajro-ondo kuregas supren!

„Vi nepre ne lasu transsalti la fajron!” resonas en miaj oreloj.

Sed kion mi, malforta hometo, povos fari kontraŭ tia fortego de la elemento? „Ne perdu la kapon!” admonas la cerbo.

„Kompreneble, vi povas fari ion! Se la fajro transsaltas, vi ne rajtas forkuri! Vi devas bati ĝin per ĉiuj korpaj fortoj, spite la

varmegon kaj spite la fumon! Kiom eble plej malmulte spiri kaj la okulojn malfermi, nur malmulte!”

La temperaturo jam estas kiel en bakforno. Alten flugas kun la fumo cindropecetoj, ofte iom brulantaj. Ve! Tiu vento! Ŝajnas infera festo.

Tie jam ekflamas filiko! Suss! Malsuprenfajfas mia branĉo kaj estingas ĝin. Sed tuj komencas dua, tria, kvara. Mi saltas antaŭen, reen, ree antaŭen kaj batas, bategas. La unua branĉo jam ruiniĝis. La duan! Pro la fumo mi ne tuj vidas ĝin kaj la flamo enrampas la arbaron. Mi saltas sur ĝin per la piedoj. Jen la branĉo! Estingiĝu vi, diablo! Ne, vi ne forbruligos nian arbaron! Suss, suss, suss! Sed la vento alportas novajn fajrerojn kaj ĉiam novajn. Estingiĝu vi kaj vi! Spiri mi preskaŭ ne plu povas. Ho, nun brulas mia vesto! Per ambaŭ manoj mi batas ĝin. Nel! Mi ne forkuro! Unu paŝon de mi rapidas urŭtŭ, tre venena serpento, el la danĝera zono al la arbaro. Mi ne havas tempon mortigi ĝin. Sus! Estingiĝu! La tria branĉo ne plu taŭgas. Per la nudaj manoj mi elŝiras verdan arbeton, por ke mi ne perdu tempon, dehakante ĝin. Sus! Sus! Hal! Tie batas aliulo. Tra la fumnuboj mi vidas la konturon de Harro. Li estis kurinta supren, kiam la vento komencis. Baldaŭ poste venis ankaŭ mia edzo de la alia flanko. Nun ni ĉiuj tri batas. Ni venkos!!

Post du horoj la plej granda amaso da brulemaĵoj forbrulis. La fajro malfortiĝis. Ĉesis la pluvo de fajreroj. Malfortiĝis la fumo. Fine aero! La pulmoj estas plenigitaj de fumo. Ni ekspiras kaj kraĉas.

Nigra kuŝas nun la tuta peco antaŭ ni kaj nur tie kaj tie, kie kuŝas speciale dika amaso da vegetaĵoj, ankoraŭ brulas. Nigraj kuŝas ĉiuflanke la karbumitaj trunkoj. Mortigitoj!

Kaj ni? Ni alrigardas nin reciproke: tri nigraj diabloj, kies okulblanko kontrastas kun la vangoj kiajn havas negroj, kun bruldifektita, hirta hararo. Mi estas sangomakulita. Pro kio? Ho, mia brako brulvundiĝis. Certe kiam mi estingis mian veston. Kaj poste mi difektis la vundon dum la batalo. Mi eĉ ne sentis ĝin. Kaj lacaĵ! Niaj koroj bategas ankoraŭ pro la superhoma streĉo. Pli ol 10 metrojn ni enpenetris en la arbaron. Ĝis tie eniris la fajro. Kia danĝero por la arbaro! Sed — ni venkis!!! Tiu venkosento kompensas ĉiujn suferojn.

„Sed kial vi ne forkuris?” demandas Aleksandro, kompateme rigardante la brultruon en mia vesto kaj la brulvundon.

„Kial? Ĉar mi staris ĉi tie, por ke mi nepre ne lasu transsalti la fajron en la arbaron!”

Erika Linz, en la praarbaro ĉe Caraguatatuba, Estado de São Paulo, Brazilo.

VOJAĜIMPRESOJ.

(Lastfoje pri nia I.J.K. en Konstanz. Ke ne por ĉiuj estis facile partopreni, pravas la suba priskribo de junulo el la orienta parto de Germanujo).

Ke meze en Germanujo troviĝas limo, ni devis senti, kiam ni intencis vojaĝi al Konstanz kaj tute ne ricevis pasporton.

Nu, ni tamen vojaĝis. Vespere ni estis ĉe la limo kaj atendis ĝis la malhela nokto kaŝos nin antaŭ la observantaj okuloj de la limpolicistoj. Estis tre pluvema nokto. La vojetoj estis ŝlimaj, herbejoj kaj kampoj malsekaj kaj en la arbaro oni eĉ manon antaŭ la okuloj ne vidis. Daŭra pluvo malsekigis niajn vestojn. Ni pensis pri la homoj, kiuj nun, kun pasporto en la poŝo, oportune vojaĝas en trajnoj.

Fulmot ...! Ĝis la maleoloj ni staras en la ŝlimo kaj preskaŭ perdas la ŝuojn. Kial niaj pensoj estis alie?

Nur unu sento ankoraŭ estas en nia kapo: ni devas sukces!

En la dua nokto ni venis antaŭ rivereton, proksimume 4 metrojn larĝa: la alia flanko estas la angla zono. Silente, sed rapidege ni preparis la trairon tra la akvon. Preskaŭ ĝis la ventro en la akvo — kaj ni estis antaŭ la „fera kurteno”. Nur tiu, kiu mem travivis tion, povas imagi kiel feliĉaj kaj ĝojaj ni estis.

Antaŭ mi estis la longa vojaĝo al Konstanz, sed nia monujo malsana aspektis. La orientgermana mono ja ne validas en okcidenta Germanujo.

La solvo: ni haltigis aŭtojn. La unua portis nin al Hannover, la dua ĝis Frankfurt/Main. Estis vere tre amuze: la ŝarĝaŭtomobilo estis nekovrita, treege malpura (ni aspektis kiel porkoj, kiam ni forlasis ĝin en Frankfurt!) kaj krom tio ege pluvis. Do ĉiuj cirkonstancoj, kiujn oni bezonas por agrabla vojaĝo!

Sed pli bela estis la revojaĝo: de Frankfurt ĝis la limo kunportis nin fermita meblarvagono kaj — la vetero estis belega! La restado en ĝi similis al karcero: oni nek aŭdis ion, nek vidis, kie oni troviĝas.

Jam estis tago, kiam ni atingis la limon kaj ni decidis pasi ĝin dum la tago. Ni informiĝis precize pri la limo kaj staris post kelka tempo nur kvin metrojn antaŭ la rusa zono. Sed la „aero ne estis pura”. Dekstre estis policisto kaj maldekstre estis alia kun hundo. Ni devis atendi, same kiel kelkaj aliaj.

Post pli ol du horoj ni rimarkis, ke la policisto kun la hundo estis ŝanĝinta sian lokon. Tio estis la momento por ni. Ni prenis niajn pakajojn kaj malaperis en la arbaro ... Post duona horo iris du esperantistoj sur la strato al la stacidomo. — Sidante en la trajno, ni sciis, ke ne plu ekzistas danĝeroj.

Ofte niaj pensoj estas en Konstanz kaj ĉe ĉiuj gesamideanoj en la urboj, kiujn ni pasis, Ili tiom bonkore kaj afable subtenis nin dum nia vojaĝo. Ni spertis la praktikon de nia idealo kaj tio donis al ni novajn fortojn por nia laboro ĉi tie.

W. B., rusa zono de Germanujo.


Voĉo el nia legantaro.

Ljubljana, 19-8-'50.

..... La lasta n-ro de LJV pli plaĉis al mi ol la antaŭlasta. Mi opinias, ke en LJV devus esti artikoloj pli mallongaj kaj multe da ili. Tiamaniere ni povos fari la gazeton pli interesa

Kralj Drago.

(Kion opinias la aliaj legantoj? Se ankaŭ vi deziras mallongajn artikolojn, do bonvulo sendi tiajn! — Red.)



I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

Dum la libertempo II.

En la kadro de la pariza kongreso kunvenis dufoje la unua komisiono: Esperanto en la lernejojn. Pli ol ducent gekolegoj plenigis salonon de la Sorbonne.

Pritraktataj estis la temoj: Esperanto en la unuagrada lernejoj, Esperanto en duagrada kaj teknikaj lernejoj, Esperanto en supera instruado kaj Esperanto kiel helpilo por blinduloj kaj surduloj.

K-o Kennedy prezidis kaj legis poste en plena kunsido de UEA-kongreso resuman raporton pri la dis-

kutoj. Kvankam ĝi estas „resuma” ni ne povas presigi ĝin tuta, pro manko de spaco. Bonvolu do kontentiĝi per „dua” resumigo.

Dum la diskutado pri la unua temo k-o Baas aldone raportas pri la situacio en Nederlando kaj speciale mencias la labormanieron de la oficejo „Esperanto ĉe la instruado”. En tiu oficejo kunagas diversaj Esperantistaj kaj ne-Esperantistaj asocioj, entute pli ol 100.000 nederlandanoj, kiuj komune klopodas influi la registaron kaj instruaŭtoritatojn. Eble en aliaj landoj oni povos agi sammaniere?¹⁾ (Ĉu oni ne povos organizi laŭ tiu ekzemplo iun internacian oficejon: Esperanto ĉe la instruado, kunlaborante kun aliaj ne-Esperantistoj internaciaj organizoj? Ĉu pere de ILEI? — Red.).

¹⁾ Versajne k-o Baas estas preta informi al interesiĝantoj. Lia adreso estas: P. W. Baas, Corn. Krusemanstr. 43¹¹¹, Amsterdam, Nederlando.

El la diskutoj evidentiĝis, ke la ĉeestantoj tre deziras pli da kuna kaj samdirekta laboro inter la diversaj landoj.

Dedieu pledas por interŝanĝado de infanaj verkaĵoj. (Vidu nian raporton en la antaŭa n-ro, kie ni skribis pri „La eta kato, kiu ne volas morti”). George nomas la presarton en la lernejo kaj reklamas tiun labormanieron.

Pfütze (Germanujo) atentigas pri interesa provo. Por trovi el la amaso de unuagradaj gelernantoj la plej kapablajn, kiuj rajtas daŭrigi la studadon en pli alta lernejo, oni bezonas iun teston. Pfütze uzas por tiu ekzamenado la Esperantan lingvon. Li „instruas” dum 4 horoj en du semajnoj ion el „tute fremda lingvo”, laŭ rekta metodo kaj iom da gramatikaj kaj donas poste taskojn al la gelernantoj por mezuri tiumaniere la penskapablojn. Kun tiel granda sukceso, ke la aŭtoritatuloj forte interesiĝas pri Esperanto. (K-o Pfütze promesis sendi la tutan raporton por LJV. Ni esperas baldaŭ ricevi ĝin. Red.).

Kühlmann (Danujo) rakontis, ke Esp. enpenetras la lernejojn en lia lando. Oni petis al lernejoj komisionoj permeson por montri kio estas atingebla per Esperanto kompare al instruado de germana kaj angla lingvoj. Li rekomendas: ne faru tro da raportoj, sed interŝanĝu spertojn; ne paroladu, sed montru la praktikon; ekz. ekspozicion per korespondado.

Ankaŭ en studentaj rondoj en Danujo Esp. progresas. Pri tio raportas f-ino Trerup. En Kopenhago estas grupo kun 40 membroj, kiu serĉas kontakton kun eksterlandaj grupoj. Ŝi atentigas pri la arkeologia tendaro, kie nunjare por la unua fojo Esp. estis uzata. Oni tie ne parolis pri Esp. sed uzis ĝin flue. Ĉiuj gazetoj favore raportis.

Stenström (Svedujo) mencias la ŝtatan subvencion por instruistaj kursoj, per kio la registaro fakte oficialigis la instruadon de Esperanto. Sekvinda ekzemplo por aliaj landoj.

Evidentiĝas, ke la instruado de Esp., precipe en duagradaj lernejoj, kontentige progresas. En Britujo 21 lernejoj kun proks. 1500 geknaboj, 550 abonis la internacian gazeton por infanoj (la lernejana parto de „La Juna Vivo”. Red.)

En Nederlando Esp. estas instruata en 33 lernejoj al preskaŭ mil gelernantoj. (Kiom el ili legas L.J.V.n? Red.).

Svisa instruoleĝo permesas enkondukon de Esp., sed la grava problemoj estas konvinki la svisan instruistaron. Fortega puŝo devas veni de la eksterlando.

En Francujo proks. 700 lernejoj studas Esperanton. La franca raporto aldonas: „la korespondado estu kolektiva en la unuagradaj lernejoj, sed individua en la duagradaj.”

Komence de la unua de septembro nunjare nova leĝo de la Berlina Eduka Instanco permesas la instruadon de Esp. Eĉ tiu instanco bone komprenas, ke la novkonstruo de Germanujo ne povas okazi sen nova edukado, kies celo estas formi pacamantan junularon.

Pri universitatoj: Aŭstrujo, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Polujo, Japanujo havas alternejojn, en kiuj oni instruas Esp.

Skoltoj havas oficialajn reprezentantojn en 15 landoj. Inter blinduloj Esp. denove rapide progresas.

Kaj — fine — por tiuj, kiuj interesiĝas pri Esp. inter sportuloj: lastatempe Marcel Rouet, bonekonata franca atleto, donis jenan konsilon al la franca junularo: „Vi havas fratojn en aliaj landoj. Do estas necese, ke vi lernu internacian lingvon.” En sia revuo „Apollon” li ĵus aperigis artikoleon favore al Esp. Espereble la alvoko atingos la orelojn de kelkaj partoprenantoj en la Olimpiado 1952. (Lia adreso estas: s-ro Marcel Rouet, Intern. Inst. de kulturismo, Nice, Francujo.

Jen la raporto de la unua sekcio. Ni konkludas, ke, kvankam la progreso de nia movado en junularaj rondoj estas videbla kaj en kelkaj lokoj tre kuraĝiga, tamen multe da laboro restas farinda kaj farenda.

P. K.

Kiu el niaj ge-legantoj sendos baldaŭ artikoleon por ĉi tiu rubriko? Kiu promesis tion en Parizo? (Red.).

Karaj Lernejoj,

Bedaŭrinde mi en la lasta monato ricevis eĉ ne unu verkaĵon. Certe vi ne ŝatas labori por via propra gazeto!

Kaj unu desegnaĵon ni ricevis. Ĝi estas de la japana knabino Hideo Sugita. Ŝi desegnis por ni. „Ĝojeto”n, la kateton, pri kiu ŝi skribis en la julio-aŭgusto-numero de „La Juna Vivo”. Eble vi poste povos vidi la bildon en nia gazeto.

S-ro Bardsley en Oldham (Britujo) skribis, ke li havas klubon „La Verda Stelo”. La anoj pagas unu pencon semajne. La knaboj kunvenas ĉiulunde kaj la knabinoj ĉiumerkrede. Ili lernas Esperanton kaj poste ludas aŭ faras manlaboraĵojn. Dum la somero oni faras ekskursojn al la kamparo. La klubpromeso estas: „Mi promesas lerni Esperanton kaj uzi ĝin”. La klubsaluto estas „Bonan tagon”.

Tia klubo estas tre interesa! Volonte ni scius, kiom da tiaj grupoj ekzistas. Ni scias, ke la plej multaj el vi lernas Esperanton en la lernejo. Sed ĉu vi ankaŭ havas Esperanto-klubon, kun propra estraro? En klubkunvenoj oni ja en agrabla kaj amuza maniero povas ekzerci Esperanton per babilado, kantado kaj ludado.

Se ni scias, en kiuj lokoj estas tiaj grupoj, ni povos meti tion en nia gazeto. Eble iam la grupoj povos viziti unu la alian!

Se vi ne jam havas klubon do klopodu formi ĝin. Kaj — skribu pri tio al ni! Ni atendas multajn leterojn!

N. K.

Ludo (Proverboj).

Unu persono iras el la ĉambro. La aliaj elektas proverbon. Ili ĉiuj devos diri unu vorton de tiu proverbo. Nun la persono, kiu eliris, denove venas en la ĉambron. Li nombras ĝis tri kaj tiam la aliaj samtempe diras sian vorton. Ili devas paroli klare, ne krii. Se la unua ludanto ne divenas la proverbon, li ankoraŭ dufoje rajtas peti, ke la aliaj ripetu la vortojn. Se li tiam ankoraŭ ne scias la proverbon, li denove devas foriri. Se li divenis ĝin, alia persono devas eliri.


NIA VERKILO.

Ni estas en la lernejo.

Mi ne helpos vin! Vi povas skribi multajn frazojn.



1



2

Kverelo sur la fenestro-breto. (Daŭrigo).

Unue ĝi prenis la vazojn kaj potojn kun hiacintoj de la fenestro-bretoj. Ili devis ekstari unu apud la alia sur la glacia lunradio. Tio estis malvarma kaj ili ege glitis sur tiu glata aĵo.

„Poste iros pli bone”, konsolis la luno.

Ĉe la florbutiko venis la plej granda grupo: multkoloraj tulipoj kaj krokusoj kaj flavaj narcisoj. Ili devis stari inter la vazoj kaj potoj. Ĉiuj estis tre malvarmaj, sed tio ne gravis.

„Ĉu mi nun havas ĉiujn?” demandis la luno.

„La blankaj narcisoj mankas“, diris la flavaj. „Oni aĉetis ilin por la malsanulejo“.

La luno sciis solvon. Ĝi faris grandan svingon — kaj jen la blankaj narcisoj jam estas sur la radio. La malvarma vento forblovis la malbonodoron de la malsanulejo kaj restis nur la freŝa narcisaodoro.

Rapide la luno kaptis ankoraŭ la galantojn el la herbejo kaj metis ilin sur la malplenajn loketojn.

Kaj jen jam la fenestro-breto. Rrrttŝŝ, la floroj glitis en la ĉambron. La bulboj en la altaj vazoj tremis pro timo kaj multe krietis. Sed neniu rompiĝis.

(Daŭrigota).

El la lerneja gazeto de Edam, Nederlando.

Mia Katino.

Dum la ferioj ni ludis kun mia katino. Iun tagon mi ĵetis al ĝi pomon en la herbon. La katino kuris post la pomo kaj haltis kun ĝi. Iam la pomo haltis ĉe kardo kaj tiu vundis la piedon de mia katino. Tiam ĝi ne plu volis ludi kun la pomo, sed ĝi ludis per mia fingro, kiun mi kaŝis malantaŭ tufoj da herbo.

C. Corbin (8-jara).

(Verkita laŭ la Freinet-tekniko).

Rakonto de papilio.

Mi naskiĝis el ovo. Mia patrino demetis min. Mi estas „vagulo“ (speco de papilio). Mi naskiĝis sur laktherbaĉo.

Kiam mi kreskis, mia haŭto streĉiĝis ĝis ĝi ekrompiĝis. Tio okazis kelkajn fojojn.

Post iom da tempo mi fariĝis pupo. Tiam la pupo elŝiriĝis kaj mi eltrovis, ke mi estas papilio. Miaj flugiloj estis ruĝaj, oranĝaj kaj blankaj, kun nigraj makuloj. Mi flirtis ĉirkaŭ la arboj kaj floroj.

Garry Parker (laŭ la Freinet-tekniko).

(El la lerneja jurnaleta „The Williw-boys own“,
Willoughby, N.S.W., Aŭstralio).

Pri Nov-Zelando.

Ni nun havas junan anon en Nov-Zelando, ĉe la parto de la mondo plej malproksima de Eŭropo. Lia nomo estas Stefan. Li estas nur dujara, do ne li povas verki artikolon pri sia hejmlando. Sed lia patro faras tion por li.

Multaj personoj pensas, ke Nov-Zelando estas parto de Aŭstralio. Se vi serĉas ĝin sur la mondkarto, vi trovas, ke tio tute ne

estas vera. Ĝi estas du mejlojn for kaj konsistas el du insuloj. Kune tiuj estas proksimume same grandaj kiel Britujo kun kelkaj malgrandaj insuloj. Aŭstralio ne regas ĝin. Ĝi havas propran registaron.



Stefan Mc. Gill, kiam li havis unu jaron.

Proksimume du milionoj da homoj loĝas tie. Nur proksimume centmil el ili apartenas al la maoria, indiĝena, raso. La maorioj havas ĉiel la samajn rajtojn kaj devojn kiel la blankuloj. Kiam mi estis knabeto, mi vizitis lernejon, kie estis kelkaj maoriaj geknaboj. Kun ili mi amikiĝis. Iliaj prapatroj venis al la lando en la dek kvara jarcento, en grandaj kanotoj, de ie malproksime en la Pacifika Oceano. La maoria nomo de tiu loko estas „Slawaiki”. Sed oni ne precize scias, kie ĝi estas.

La unua blankulo en Nov-Zelando estis nederlandano, Abel Tasman. Li nomis ĝin laŭ nederlanda provinco. Kaj lian nomon vi vidas ankaŭ en la „Tasman Maro” inter N.Z. kaj Aŭstralio kaj en la Monto Tasman.

Anglo, James Cook, poste vizitis ĝin, precize surkartigis la marbordojn kaj aneksis ĝin al Britujo. Lian nomon oni vidas en „Book-Strait”, markolo inter la Norda kaj Suda Insuloj kaj en la Monto Cook, la plej alta el la montoj (ĉ. 12.000 futoj).

La tereno estas grandparte monteca kaj la pejzaĝoj estas belegaj.

Antaŭ ol venis la blankuloj la tuta lando estis kovrita de densa arbaro. La arbospecoj estis tipaj por N.Z. kaj ne troviĝas aliloke. Nun oni forhakis la pli grandan parton kaj en kelkaj lokoj erozio de la tero jam aperas kiel malbona frukto de tiu arbo-buĉado. Tamen multo restas.

La ĉefaj produktoj estas butero, fromaĝo, viando kaj lano.

Multaj el la loknomoj estas maoriaj. Kaj la plej multajn el ili oni bone povas prononci, se oni traktas ilin kiel Esperantajn nomojn. Tio estas, ĉar la maorioj ne havis skriblingvon. La literumadon, kiun ni nun uzas, aranĝis franco kaj li uzis preskaŭ la saman fonetikan bazon kiel ni por Esperanto. La akcento eĉ preskaŭ ĉiam falas sur la antaŭlastan silabon. Maorioj kaj Sudmarinsulanoj bonege elparolas Esperanton post nur mallonga instruo.

Stefan loĝas ĉe Pinehaven (tio ne estas maoria nomo). Ĝi estas vilaĝeto, 17 mejlojn for de Wellington (ankaŭ ne maoria), la ĉefurbo. Sur la karto vi trovas ĝin en la suda parto de la norda insulo.

La maoria nomo de Nov-Zelando estas „Ao-te-aroa”, tio estas „lando, simila al longa, blanka nubo”. Ĉar tia ĝi aspektis al la unuaj maoriaj esploristoj, kiam ili alvenis en la kanotoj.

La lando estas treege interesa laŭ vidpunkto de botaniko, zoologio (birdoj kaj kelkaj lacertoj, sed strange, estas neniu indiĝenaj mambestoj), geologio kaj la moroj de la maorioj. Sed tion mi nun ne povas pritrakti.

Do Stefan kaj liaj gepatroj diras: „Slaere ra!” (Adiaŭ!)

D. Mc. Gill, Pinehaven, Heretaunga, Nov-Zelando.

Du inteligentaj papagoj.

Estis maljuna fraŭlino. Ŝi posedis inteligentan papagon. Sed ŝi havis ankaŭ du nevojn. Tiuj instruis al la papago multajn malbonajn frazojn.

Kiam ĝi vidis la virinon, ĝi diris: „La diablo prenu vin!”

Tio tiel ĉagrenis ŝin, ke ŝi portis la papagon al sia amikino, kiu ankaŭ posedis papagon. Sed tiu estis tre ĝentila kaj bonkondata birdo. Ĝi parolis nur bonajn vortojn. La fraŭlino esperis, ke ŝia papago lernos tiujn kaj forgesos la malbonajn frazojn.

Post du monatoj ŝi iris por repreni la birdon al sia hejmo.

Kiam la du papagoj vidis ŝin, la malbona kriis: „La diablo prenu vin!” kaj: „Dio aŭdu nian preĝon!” diris la alia.

Herta Kraŭs (lernanto de G. B. Tordoff en la Teknika Kolegio, Bath, Anglujo).

Ekzercu!

Diru trifoje, tre rapide, jenan frazon: „Ŝafisto sekvas siajn ŝafojn sur la ŝoseo; ŝafhundo sekvas la surŝoseajn ŝafojn de la ŝafisto”.

Ludkanto „Velu ni”.

(La muziko estas laŭ la Tonik-Solfa-Sistemo) ¹⁾.

Gamo: G.

2/4

d : d . d Mi ir - is		l ₁ : s ₁ nord - en,		d : d.d mi ir-is		l ₁ : s ₁ sud - en,	
d : d Nord-en,		d : d sud-en,		m : s . s per vag-on-		m : d ar - o	
s : m.m He - di-di		s : m va-ro!		d : d . d per vag-on-		l ₁ : s ₁ ar - o,	
d : d . d Mi pli vol-		m : s . s on-te vet-		m . m : r . r ur-as sur la		d : d. mar - o.	
m : s Vel-u	s : - ni,	m : s vel-u	s : - ni,	l : s vel-u	s : m sur la	m : - mar-	r : - o.
d : d Nov-an	l ₁ : s in-on	d : d trov-u	l ₁ : s nun,	d : m ki- a	s : m bel-a	r : - par-	d : - o!

Formacio: Paroj faras duoblan rondon (knaboj interne, se estas pli da knaboj ol knabinoj: kaj inverse). Ili krucligas la manojn, kvazaŭ ili glitkuras. En le mezo de la rondo staras la senkunulinaj knaboj.

Ludmaniero: La paroj rondpromenas malrapideme en baldanca direkto kaj kantas laŭ lule-svinganta ritmo (Ili estu malrigidaj, svingante la korpon facile de la koksoj). Ĉe la vortoj „veturas sur la maro” ĉiu turnas for de la kunul(in)o, dors-al-dorse, sed daŭre tenas ties manojn. Por fari tion, necesas levi la brakojn.

La paroj tiam disiĝas. La knabinoj daŭre promenas ronde en la originala direkto, la knaboj rondiras en la kontraŭa direkto. Dume,

¹⁾ **Noto de la red.:** La presado de ordinaraj notoj estas tre multekosta. Tial ni petis indiki la melodion per „cifernotoj”. Gordon Watson anstataŭe faris tion per „liternotoj” laŭ la „tonik-solfa” sistemo. Ni ne konis tiun sistemon kaj ne scias, ĉu ĝi estas internacie konata, sed ĝi estas facile komprenebla por muzik-amantoj. Tial ni montre presigas la melodion per „liternotoj”. Ciu litero indikas la komencon de la nomo de „cifernoto”: d=do=1; r=re=2; m=mi=3, ktp. ŝ=sol=5 (pli alta ol la tono d); s₁=sol=5 (malpli alta ol la tono d). La du-punkto indikas la mezon de la takto.

la unuopuloj en la mezo venas en la knaban rondon. Ĉe la vorto „Kia” ĉiu knabo tenas la manojn de la plej proksima knabino. Se li maltrafas, li iras en la mezon. La novaj paroj rondiras denove laŭhorloĝe kaj oni ripetas la kantludon.

Esperantigis Gordon Watson, Greenford, Anglujo.

ENIGMOJ.

Raportoj: Mi ricevis dek du provojn. La plej multaj estis ĝustaj, sed kelkaj ne rimarkis, ke en 7 kaj 8 estas kaŝitaj **du** bestoj.

La kaŝitaj bestoj estas: rato, muso, aglo, tigro, leono, kuniklo, rano, azeno, urso, kato.

Bedaŭrinde en la unua enigmo staris preseraro: 6. C-E: ĝoja bruo, devis esti: 5. C-E. (Ja estis nur 25 ĉeloj).

Horizontale en la krucvort-enigmo staras: dento, avara, notic, kluki, iurid.

En la pasinta jaro aperis kvin enigmoj kun kvindek eblaj poentoj.

Entute sesdek unu geknaboj sendis solvojn. La plej multaj venis el Britujo, sed estis ankaŭ kelkaj el Nederlando, Francujo, Ĉeĥo-slovakujo kaj Maroko.

Kvinfoje ensendis: J. Prentice (36), V. Bennett (34), S. Marshall (34), P. Robilliard (34). Kvarfoje ensendis: M. Boyd (35), M. Richards (34), V. Baylis (30), S. Price (30), A. Price (29), M. Brookes (29), B. James (25), Z. Vine (23).

Nova enigmo: Inter la literojn „K” kaj „O” metu:

unu	literon	por	demanda vorto;
du	literojn	por	laŭta sono;
tri	„	„	aro da geknaboj;
kvar	„	„	osta skatolo;
kvin	„	„	nigra birdo;
ses	„	„	granda kunveno;
sep	„	„	granda besto;
ok	„	„	parto de la tero;
naŭ	„	„	flataj vortoj;
dek	„	„	socia sistemo.

Eble vi ne trovos ĉiujn. Tamen sendu tiom, kiom vi trovis, **antaŭ la 20-a de oktobro** al s-ro Slade, 7 Southview Road, Southampton, Anglujo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando*).



La aktiveco ankoraŭ iom dormas en niaj rondoj. Tamen ni ricevis ĝojigan komunikon el **Parizo**. Nia loka peranto tie esperas baldaŭ fondi TJO-sekcion en la franca ĉefurbo. Oni eĉ eldonos monatan bultenon „La Folieto”. Ni tre kore dankas Michel Duc pri tiu sukceso! **Kiu sekvos la ekzemplon?**

La estraro ankoraŭ ne fiksas la lokon por la sekvonta I.J.K., sed ĝi esploras la eblecojn en la nederlanda havenurbo Rotterdam.

Aperis „Peranto inter la Perantoj”. Interesatoj, kiuj ĝis nun ne ricevis la bultenon, povas peti ekzempleron kontraŭ unu internacia respondkuponon ĉe la sekretariino.

Anoj en **Germanujo** bonvolu atenti, ke la ĝironumero de la ĉefperanto estas: München 92299 (Günther Schaedel, Kaulbachstr. 61).

SKOLTA RUBRIKO.



Skolta Esperantista Tendaro. — Dum la kongreso de UEA en Parizo okazis en Ablon, sude de Parizo, je la 6-a de aŭgusto kunveno de esperantistaj skoltoj.

Tiun skoltan kunvenon partoprenis samideanoj el Britujo, Francujo, Nederlando, Hispanujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Ĝia prezidis s-ro Davis, prezidanto de la skolta Esperanto-ligo, kaj doktoro Symes, diplomita estro de la internacia lernotendejo en Gilwell Park (Britujo).

Nun ekzistas en Zeist (Nederlando) oficiala skolta grupo por Esperantistoj. Ĝi nomiĝas Doktoro-Zamenhof-Grupo. Estroj de tiu grupo partoprenis la kunvenon en Ablon.

Dum la debatoj oni sciigis nin, ke la grupo de la sendependa federacio de neŭtralaj skoltoj en Marseille ĉiumonate publikigas Esperantokurson en sia bulteno. Inter ni troviĝis ankaŭ membroj de la pariza grupo de tiu federacio.

Ĉe la tendara fajro ni kompreneble kantis en Esperanto. Oni certe povas opinii ke la tendara fajro sukcesis, ĉar eĉ ne-Esperantistoj venis al la urbeto por aŭskulti la Esperanto-kantojn.

Tiu kunveno estis la unua postmilita tendaro de esperantistaj skoltoj. Ĝi estis pruvo, ke Esperanto estas taŭga lingvo por skoltoj. Ni do esperas, ke tiaj tendumoj okazos tiom ofte kiom eble.

Zigzaganta Hipopotamo.

Unue la senpacienca kamarado Peintinger. Li sendis al ni 20 gramojn da diversaj pm. kaj deziras 10 gr. da pm. el Azio aŭ Afriko. Li ne sendis al ni resp. kuponon, sed post kelkaj tagoj senpacienca leteron kun la demando: kie restas miaj pm.? — Kara amiko, ni mem nek presas, nek presigas pm. Kiam ni mem ricevas ilin, ni tuj transsendas ilin. Pacienca, ni nepre respondos.

Alvoko al ĉiuj: Sendu al ni pm, afrikajn kaj aziajn. — Nia amikino en Maroko jam aŭdis vin kaj sendis marokajn. Koran dankon. Ĉu vi jam ricevis nian sendaĵon, f-ino Zarca? Ni vane serĉis vin en Konstanz. Bedaŭrinde, ĉu?

Dankon al kamaradoj Alois Postl en Aŭstrujo kaj Jussi Sive en Finnlando, pro viaj donacoj. Ni bone povis uzi ilin.

Ĉu s-roj Knapp kaj Schneider jam ricevis niajn pm? Ni jam posedas multajn ordinarajn germanajn pm. Se eble vi bonvolu poste sendi pli belajn. Tiam ni povas ĝojigi ankaŭ aliajn kolektantojn. Bedaŭrinde viajn pm. transloĝiĝis al nia kesto de ne-interŝanĝeblaj pm. Kaj kie estas viaj respondkuponoj?

La sama respondo validas por niaj tri amikoj: Amparo Loras, Vincente Rodrigo kaj Albino Navarro en Hispanujo.

Tamen koran dankon al ĉiuj.

La plej lasta estas la plej bona: Dankon, amiko D. R. Broadribb en Usono, pro la pli ol 1300 pm. donace.

Escepte de la letero de amiko Peintinger ni respondis ĉiujn leterojn kiujn ni ricevis, ĝis la 15-a de septembro. Ni atendas multajn novajn.

Kiu sendos al ni pm. por interŝanĝi? Ni povas interŝanĝi ĉiun kvanton.

Libro-Servo TJO, M. Tinxgracht 10, Edam, Ned.

Ne forgesu nian Libro-Servon!

Kvankam ni en lasta tempo ne multe propagandis, nia libro-servo tamen ekzistas kaj la Internacia Junularlaboro ege bezonas vian helpon!

Por kursoj ni havas bonegan materialon! 1. „**Sub la Verda Standardo**”, plena metodo, jam tre konata, konsistanta el: **Gvidilo** (por la instruisto): **2,50 guld.**; **Laboriloj I kaj II: po 0,90 guld.**; **Memorigilo: 0,50 guld.** — 2. **Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo”** kun apartenanta vortlisto (tre taŭga en komenckursoj): 0,65 guld. — 3. **Binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo”** (de la jaroj '34/'35, '35/'36, '36/'37), preskaŭ 200-p. libroj, kiuj enhavas kurson, legomaterialon por komentantoj kaj progresintoj, kantojn, ludojn, enigmojn, ktp. Perfekta materialo por klubvesperoj. **Prezo nur po 1.— guld.**

Plue ni povas liveri al vi ĉiujn librojn kaj esperantajojn. La TJO-poŝtpapero estas tre bonkvalita! Mendu al la **TJO-Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando.**

Ricevitaj Esperantajoj.

„**Monda Federacio**”, de Tom O. Griessemer (ĝenerala sekretario de la Mondmovado por Mondfederacia Registaro), trad. de G. Rust kaj H. Penfold. La 4-p. presajo estas eldonita de „World Student Federalists”, 20, Buckingham Street, London W.C. 2, Anglujo.

„Resumo de la plano por la Tutmonda Popola Delegitaro, 4-p. presajo, trad. de E. P. Ockey, eld. de „Internacia Gvidkomitato de La Tutmonda Popola Delegitaro”, 54 Baker Str., London W.I. — Ambaŭ broŝuroj estas haveblaj (kune) kontraŭ unu resp. kupono ĉe 22 Standish Rd., London W. 6, Britujo.

„Esperanto in der Tasche” de W. kaj H. Wingen, eld. de Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg/Lahn, Germanujo. 44-paĝa libreto, tre praktika por germanaj esperantistoj. Post gramatika resumo ĝi donas konverzaciajn frazojn en la germana lingvo kaj en Esperanto, uzeblaj ĉe ĉiaj okazoj en la ĉiutaga vivo.

Bavario, bela faldprospekto, riĉe ilustrita, eld. de la ŝtata komisiito por la bavara fremdultrafiko en München; kaj **Ferioj en Germanujo**, 4-p., multkolora presita prospekto eld. de la Germana Federacia Fervojo.

GENERALAJ INFORMOJ.

La venonta **UEA-Kongreso** okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1951 en München, Germanujo (Engelbertstr. 7).

Kongreskotizo ĝis 31-12-'50: por ordinara kongresanoj: 18 gm (edzo aŭ edzino de kongresan(in)o: 9 gm, gejunuloj, ne pli ol 20-j.: 5,5 gm). — Ĝis 31-3-'51: resp. 21 — 10,50 — 7. gm. — Poste: 24 — 12 — 8 gm.

U.L.M.U.A. (Universala Ligo por Mondpaco pere de Universala Amo). Sekve de prelego de Gunnar Rugland en la plej granda ejo en Trondhejmo, Norvegujo, stariĝis la unua malgranda grupo. Oni petu informojn al la Liga adreso: Nedre Keisemark 1, Horten, Norvegujo.

Se eble oni aldonu internacian respondkuponon.



Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Anglujo: G. F. Brooks, Cator House Farm, Framwellgate Moor, Durham, dez. kor. kaj interŝ. il. pk. kun la t.m. (pr. k. studentoj kaj geinstruistoj).

Bulgarujo: Venelin Fitiloff (17-j.), Republikanska 84, Burgas, dez. kor. kun Esperantistoj en la t. m. kaj interŝ. pk., pm., kaj gazetojn.

Ĉeĥoslovakujo: Venda Levora, Chrastava u Liberce, dez. kor. kaj interŝ. pm. kun la tuta mondo. Respondo certa.

Franco: Fraŭlo Mourlon Gérard 116 rue Charles Keller, Nancy, (M et M) dez. interŝ. pm. k. ĉ. I. (posedas francajn kaj sarlandajn) Resp. certa.

F-ino Belhomme Yvonne, 5 rue Dom Calmet, Nancy (M et M) dez. kor. kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj.

Jugoslavujo: Bošić Ivan (16-j.), Kranj. Gasilski trg., dez. kor. kaj interŝ. poŝtkartojn kun la tuta mondo. Resp. certa.

Nederlando: Al ĉiu, kiu sendos al mi bildkarton pri ventmuelilo, mi sendos tian karton pri nia belega muelilregiono, ankaŭ al holandanoj. E. v. Walsum, Fop Smitstr. 68, Alblasserdam (Z.H.).